TAMEN PLU

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, FEBRUARO 2010, JARKOLEKTO 29
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@bigpond.com
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Sidas Oberon en la drinkejo "La Rompita Glaso" kiam prosperaspekta viro nomata Philaret eniras kaj salutas lin: "Saluton Patroclus!"
Oberon: "... ?"
Philaret: "Ho Patroclus, jam dudek jarojn mi ne vidas vin."
Oberon: "Vi mis…"
Philaret: "Jes, ja, la bonaj malnovaj tagoj, ĉu ne? Kiam ni ambaŭ laboris en la aŭtomobilriparejo."
Oberon: "Sed mi estas certa, ke vi eraras."
Elprenas sian monujon Philaret. "Nun mi repagos al vi la 60 dolarojn, kiujn vi pruntedonis al mi, kiam ni laboris en la aŭtomobilriparejo.
Oberon: "Ha, jes, la aŭtomobilriparejo, nun mi bone, eĉ bonege, memoras vin!"

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 3an de februaro la legorondo renkontiĝos en la Ŝtata Biblioteko je la 10.30a horo.
Merkredon la 3an de februaro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.
Merkredon la 10an de februaro la legorondo renkontiĝos en la Ŝtata Biblioteko je la 10.30a horo.
Merkredon la 17an de februaro la legorondo renkontiĝos en la Ŝtata Biblioteko je la 10.30a horo.
Merkredon la 24an de februaro la legorondo renkontiĝos en la Ŝtata Biblioteko je la 10.30a horo.

La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.
Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso refoje okazos en Adelajdo. Kiel sciate, la unua AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911.
Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!
La Esperanto-kongreso de Universala Esperanto-Asocio okazos en 2012 en Hanojo, Vjetnamo.

La distriktkuracisto veturas kune kun sia edzino tra la malgranda urbeto, en kiu ili loĝas.

”Vi ne veturigu la aŭtomobilon tiom rapidege. Kio okazus, se la vilaĝa policisto vidus nin?”

”Trankviliĝu”, respondas la distriktkuracisto, mi jam ordonis al li resti en la lito unu tutan semajnon”.

Bona ŝanco por Esperanto

Sin preparante por du mondaj eventoj okazontaj en Brazilo en 2014 kaj 2016 nome Monda Piedpilkbatala Ĉampioneco kaj Olimpikoj, la brazila registaro en 2010 ekkonstruos fervojojn por supervagonaro, kiu atingos 350 km. ĉiuhore, la t.n. kuglovagonaro.

Tiu kuglovagonaro iros de la mirinda urbo Rio-de-Ĵanejro – RJ ĝis Campinas – SP, preterpase de provinca ĉefurbo Sao Paŭlo, ĉirkaŭ 380 km for. Oni investos ĉirkaŭ U$ 23.000.000. T.e. por konstruado plus ekspropriigo de konstruaĵoj.

Ni petos ke la afiŝtabuloj de la tuta projekto prezentu informojn ankaŭ en Esperanto, ĉar la popularega prezidanto Lula (Luis Inacio Lula da Silva) antaŭ nelonge per letero al la UEA-prezidanto Probal Dasgupta oficiale deklaris sin favora al Esperanto.

La brazila senato ĵus aprobis leĝon permesanta instruadon de Esperanto en ĉiuj brazilaj mezgradaj lernejoj.

Tre faciligos la viziton kaj vivon de eksterlandaj turistoj en Brazilo, ke Esperanto estas lingvo internacia!!

La koridoro Rio-de-Ĵanejro – Sao Paŭlo estas certe la plej riĉa kaj plej homoplena, kaj politike strategia en Brazilo. La kuglovagonaro interligos la tri plej grandajn flughavenojn en Brazilo, kiuj estas Galeao, Guarulhos kaj Viracopos.

Direktoro Ruperto vojaĝis al Nordjutlando por iom feriadi. Ĉe la stacidomo lin atendis Kuriloso kun ĉevale tirata veturilo. La veturilo ekveturis kaj ili survojis al la somerdomo de Ruperto. Sed, subite Kuriloso haltigis la ĉevale tiratan veturilon kaj ĝoje salutis viron irantan sur la vojo.

"La paco de Dio estu kun vi Vinstono! "Mi vidas, ke vi iom promenas".

"Jes, fakte vi pravas", diris la piediranto.

"Nu, do ĝis revido, Vinstono"!

Kuriloso reirigis la ĉevalon dirante al Ruperto:

"Mi sincere petas vian pardonon, sinjoro, ĉar mi haltigis la ĉevale tiratan veturilon. Sed la viro, kun kiu mi parolis, estas mia frato Vinstono, kiun mi ne vidis sep jarojn. Laŭ mia opinio estas tre bone iomete interparoli kiam oni renkontiĝas…

Esperanto-kunveno en Mezoriento

Okazos Esperanto-kunveno en la Meza Oriento kun Nasredin Hoĝa en Eskiŝehiro de la 2a ĝis la 5a de aprilo 2010 kun postkongreso.

Eskiŝehiro estas turka urbo inter Istanbulo kaj Ankaro. Nuntempe ĝi estas universitata urbo tre moderna. En la antikva tempo kaj en la meza epoko ĝi estis same fama. Tie loĝis la heroo de ĉiuj popolrakontoj en la islama mondo, Nasredin Hoĝa, kies specialaĵo estis helpi popolanojn kaj spiti regantojn, saĝulojn kaj similajn. En Esperanto ekzistas kelkaj libroj pri li, eldonitaj en Ĉinujo, kien portis lin la ujguraj ĉinoj.

Tie okazos la Tria Mezorienta Kunveno aranĝata de la Komisiono Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA. La kunveno komenciĝos la 2an de aprilo kaj finiĝos la 5an de aprilo 2010.

Kiam vi atingos Istanbulo la vojaĝo al Eskiŝehiro daŭros nur 3 horojn. La kosto por unu tago estos 20 eŭroj (tranoktado, matenmanĝo kaj vespermanĝo). Aliĝu mesaĝante al mezorienta-kunveno@yahoogroups.com. Ĝis la fino de februaro la aliĝkotizo estas 10 eŭroj. Poste ĝi estos 15 eŭroj.

Okazos kvartaga postkongreso: 1) Bejŝehiro: du horojn el la kongresurbo. Bela urbeto el Otomana tempo. Tranokto en tre malnova domo. 2) Matena forveturo al Ankaro, la turka ĉefurbo. Duontaga vizito al la kastelo de Angoro kaj belega muzeo. Forvojaĝo al Kapadokio. Tranoktado. 3) Du tagojn en Kapadokio. 4) Forveturo al bela urbo Kajseri. Vizito al la urbo kaj flug- aŭ busvojaĝo al Istanbulo.

La kosto de la postkongreso anoncotas. Ni pretas tre flekseble respondi viajn dezirojn kaj eble lastmomente ŝanĝi niajn planojn.

Kontaktu nin mezorienta-kunveno@yahoogroups.com

Por la komisiono Meza Oriento kaj Norda Afriko, Murat Ozdizdar, Tom Juval kaj Renato Corsetti.

”Kial la poŝtisto ĉiutage kisas nian ĉambristinon?” demandas eta Oskaro sian panjon.

“Tio verŝajne estas, ĉar li ŝatas ŝin, respondis ŝi.

“Jes, sed ankaŭ la policisto sur la vojo kisas ŝin”.

“Do ankaŭ li verŝajne ŝatas ŝin”.

“La plumbisto, kiu estis ĉi tie ĉi-matene, kisis ŝin antaŭ ol li foriris”! Daŭrigas eta Oskaro.

”Do plej verŝajne ankaŭ li ŝatas ŝin, suspiris Panjo. Nu iru en la liton”.

Profunde pensante Oskaro iris supren laŭ la ŝtuparo. Plej supre li sin turnis dirante: ”Kompatinda Paĉjo, kiom da konkurantoj li havas”.

Statistiko pri la agado de ”Esperanto en Sudaŭstralio” en 2009

Mi estas Katja Steele. En 2006 mi decidis, ke ”IU” ”IE” devas noti, kio okazas en Sudaŭstralia Esperantujo. Ne surprize tiu ”IU” iĝis mi mem kaj do en 2007, 2008 kaj 2009 mi faris notojn pri ĉiu nia aktivaĵo. Tiel estiĝis jam tri

taglibroj-memorlibroj-protokollibroj, en kiuj mi klopodis kolekti precipe faktojn kaj nur malmultajn emociojn.

Surbaze de la enskribaĵoj en tiu ĉi jaro mi nun prezentas al vi kelkajn el la bazaj datenoj de la lastaj 12 monatoj. Mi avertas vin: temas pri seka legaĵo, kvazaŭ telefonlibra sterileco. La ideo estas, ke iu alia donu la "sukon", prefere multaj aliaj. Diru-skribu, kion vi pleje ŝatis, kion vi ne plu volas ripeti, ĉu vi kontentas pri niaj faroj, ĉu mankis al vi io, ĉu estas bone venontjare aldoni ion.... Nia ĉefredaktanto verŝajne volonte akceptos viajn – eĉ se nur 2-3 frazajn – komentojn.

Membreco: Membrokotizon de la klubo pagis 14 personoj: 1. Indrani Beharry-Lall; 2. Sandor Horvath; 3. Helen Palmer; 4. Patricia Palmer; 5. Trevor Steele; 6. Katarina Steele; 7. Margaret Furness; 8. Brendan Linnane; 9. Carol Linnane; 10. Eileen Jones; 11. Gloria Bristow; 12. Robert Felby; 13. Audrey Felby; 14. Nancy Roy.

Sporade partoprenis niajn aranĝojn ankaŭ: 15. Dan Ehlers; 16. Ashika Ehlers; 17. Charles Stevenson; 18. Heather Furby; 19. Michael Holland; 20. Cathy Taggart; 21. Michael Taggart; 22. Libby Mortimer; 23. Arthur Mortimer; 24. Finnur Larusson.

<u>Kunvenoj</u>: La klubanoj kunvenadis unu fojon monate, la unuan merkredon de la monato inter la 18a kaj 23a horoj. La kunvenejo estis ĝis junio la komunumejo en 72-74 East Avenue, Black Forest, S.A. 5035, de julio ni kunvenadas en Box Factory, Regent Street South, Adelajdo, S.A. 5000.

Okazis 10 klubvesperoj kun averaĝe 9 partoprenantoj. Krome ni havis 9 apartajn aranĝojn kiel: ekskursoj, teatra kaj kviza vesperoj, vizito al muzeo, floraranĝado, kantvespero, Esperanto-ekspozicio. La plej sukcesa estis nia lasta kunveno: la Zamenhoffesto. Partoprenis ĝin 19 personoj.

La partoprenadon en la aktivadoj negative influis: gravaj malsanoj (A. Mortimer, H. Palmer), longdaŭraj eksterlandaj vojaĝoj (I. Beharry-Lall, P. Palmer, N. Roy), naskiĝo de bebo (familio Ehlers, Finnur Larusson), laborposteno krom-Adelajda (S. Horvath). Plej multajn kunvenojn partoprenis Trevor, Katja, Bob, Audrey kaj Indrani.

Eldonaĵo: Nia kluba bulteno *Tamen Plu* regule aperis ĉiumonate, redaktite kaj ankaŭ distribuite de Bob Felby. La jarkolektojn de la bulteno ni sendis al Esperantomuzeo en Vieno kaj al Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en Svislando.

Apartaj aktivaĵoj: Tri el niaj membroj aktive partoprenis la Somerkursaron de 2009 (S. Horvath, T. Steele, K. Steele), la UK-n en Pollando I. Beharry-Lall. Dum la Lingva Festivalo en Torquay (Viktorio) aktivis K. Steele. Pluraj paŝoj estis faritaj prepare al la festa kongreso de 2011; ni jam mendis la ejojn kaj certigis havi ekspozicion en la Migrada Muzeo de Adelajo.

Financoj: Pri la kaso de la klubo zorgis I. Beharry-Lall, pri la aparta monkolekto) entute $ 210) A. Felby. La lasta sumo iris al fondaĵo *Evidente*, kaj estos uzata en Maŭritanio.

S-ro farbŝmiristo, mi ĵus revenis el la artekspoziciejo. Mi devas konfesi, ke viuj pentraĵoj estas la nuraj, kiujn mi povis rigardi."

"Ho, koran, eĉ koregan dankon, eĉ dankegon."

"Jes, ĉar tro da homoj amasiĝis antaŭ ĉiuj la aliaj."

Anstataŭ mallumon enlasu Lumon

Antaŭ multaj jaroj, fakte antaŭ la komenciĝo de la tempo, ekzistis sur la Tero nur sunbrilo, ĉar ankoraŭ ne estis inventitaj altaĵoj, eble mi devus diri altuloj, kiel oni ankoraŭ diras en kelkaj lingvoj, fakte oni diras "altaj sinjoroj", en Esperanto eble "altaj gesinjoroj".

Gealtuloj ne nur iluminas, sed ankaŭ ombras, ĉu ne? ĉar ju pli alta io aŭ iu estas, des pli da ombro ĝi, li, ŝi kreas. La tuta mondo estis same plata kiel platkuko, kaj la suno brilis tiom akre, kiom ĝi ankoraŭ hodiaŭ faras en Aŭstralio.

Tio estis, kompreneble, tre agrabla por la terloĝantaro. Loĝis tiam sur la Tero tre multaj specioj de bestoj, multe pli multaj ol hodiaŭ. Loĝis ekz. ronkantaj dinosaŭroj; pepantaj birdoj, el kiuj iuj ankaŭ trilis; tre silentemaj helikoj; ankaŭ kelkaj limakoj, ili estis nigraj; bojantaj hundoj kaj miaŭantaj katoj; henantaj ĉevaloj; muĝantaj bovinoj kaj ursoj. Kaj krom ili loĝis ankaŭ la homaro. Ankaŭ ghi ronkis,

bojis, pepis, trilis kaj silentis. Kelkfoje eĉ muĝis, sed nur tre malofte miaŭis.

La homaro tiam, malsame kiel nun, ankoraŭ ne estis egoisma. Ĝi ne erare kredis, ke ĉio estas kreita por ĝia bonfarto kaj plezuro, kaj tial ĝi ankoraŭ ne komencis sisteme detrui ĉion, plantojn kaj bestojn, aliajn homojn, kaj eĉ sin mem. Tio sekvis poste, eble pro la posta invento de tabako, drogoj kaj alkoholo!

Sed tiam aperis la altaĵoj, kaj kun ili ankaŭ la Ombro, sur la Tero. Unue neniu sciis, kio Ombro" estas, sed ili baldaŭ lernis, kaj iom post iom la homo kuraĝis paroli al sia Ombro. Iom post iom la Ombro kaj ĝia homo interamikiĝis, kaj iun belan tagon eĉ geedziĝis, kaj ekhavis idojn, ĉar tiajn oni rajtas havi, sed nur kondiĉe, ke oni estas geedzoj. Tion vi ĉiuj eĉ tre bonege scias, ĉu ne?

La idoj vivis en la Ombro de siaj gepatroj, kaj estis miksaĵo inter lumo kaj mallumo. Do duonlumo. Tiam komenciĝis la malboniĝo de ĉio. La mallumo proponis, ke agrable estus manĝi unu la alian. Kelkaj bestoj komencis manĝi plantojn, aliaj manĝis aliajn bestojn, aliaj manĝis homojn kaj la homoj komencis manĝi bestojn, plantojn kaj homojn.

La homoj tiam parolis milionojn da malsamaj lingvoj. Estis neeble por ili kompreni unu la alian, kaj tio tre helpegis al la Ombro, kiu flustris en la orelojn de la homoj, ke tiuj, kiuj parolas alian lingvon estas malbonaj kaj meritas la morton. Fakte ĝi proponis, ke oni mortigu ilin.

Tio estis la komenciĝo de la tempo, en kiu ni nun vivas. Superregas la detruadon la "moderna" homo nun, kun la helpo de industriistoj, armeoj kaj registaroj.

Sed ne nur industriistoj, registoj kaj armeanoj kulpas. Kulpas ankaŭ ordinaraj, preskaŭ senkulpaj impostopagantoj. Ankaŭ al ili la Ombro flustras en la orelojn, ke estas bone malami tiujn, kiuj parolas alian lingvon aŭ devenas de fremda lando. Do mensogoj plimultiĝis same kiel la mortigado kaj detruado.

Tio kompreneble malpurigis la mensojn de la ordinaruloj, kiuj komencis glori la militojn kiel ankaŭ tiujn, kiuj mortigis unu la aliajn sur la batalkampoj.

Sed iu bona, eĉ bonega homo en Bjalistoko, homo neinfluebla kaj tial neinfluata de la Ombro, kontraŭbatalis tion kreante neŭtralan lingvon facile lerneblan al ĉiuj. Multaj homoj eklernis ĝin montrante la vojon irendan al ĉiuj aliaj, kaj vere ŝajnis, ke paco eblas sur tiu ĉi planedo. Sed bedaŭrinde aperis sur la Tero pli kaj pli da altaj gesinjoroj, kaj kun tiuj pli kaj pli da Ombro. Nun la homoj vivas en pli da Ombro ol da lumo, tio estas facile videbla, ĉu ne?

Do, la homoj degeneris kaj eĉ multaj el la adeptoj de la kreinto de la neŭtrala lingvo eksentis malamon kaj malicon al aliaj adeptoj tiele plifortigante la forton de la Ombro, kiu tial ne plu estis nur forta, sed eĉ fortega.

Multaj el la adeptoj estis malbonvenaj en almenaŭ unu el la organizaĵoj de la amantoj de la neŭtrala lingvo, kaj ankoraŭ pli multaj vere sentis sin tiom malbonvenaj, ke ili simple forlasis la organizaĵon. Kelkaj eksentis emon tute forlasi la ideon de la sanktulo el Bjalistoko, ĉar tro multaj adeptoj en altaj pozicioj de la neŭtrala lingvo ne plu uzadis tiun belegan, neŭtralan lingvon, sed inter si kaj en la komuniko kun ordinaraj membroj anstataŭigis ĝin per sia denaska lingvo. La Ombro ĝojegis. Ekregis sur la Tero anstataŭ amikeco, nur malamikeco kaj malico. Tio estis plorinda afero, ĉu ne?

Nur tre malmultaj homoj povas vidi la konsekvencon de la malamego. Ili volas – aŭ ĉu mi diru deziras, eĉ deziregas? – ke ĉiuj revenu al la tempoj malnovaj, kiam samideanoj amase venis al la kongresoj kaj somerkursaroj. Ĉu estas tro malfacile kompreni, ke se nenio okazos, kio povas forigi almenaŭ iom de la Ombro, la neŭtrala lingvo kreita de la bonkorulo en Bjalistoko, eĉ tre baldaŭ vidos la finon de sia ekzisto. Necesas agadi nun aŭ vere la Lumo estingiĝos por la organizaĵo. Anstataŭ Mallumon enlasu Lumon. Bonvolu konsideri tion !!!

S-ino Maredudd: "Kian vinon vi ŝatus trinki dum nia vespermanĝado?"

S-ro Maredudd: "Kian manĝaĵon vi ŝatus manĝi dum nia vespervintrinkado?"

Kaj jen io serioza. Sendis ĝin Nicole. Temas pri geografio. Trovu italan urbon. Eble ĉi tio helpos: ESTO, ESTO, ESTO. Estu pacienca, la solvo aperos en marto!

”Mia edzo havas novan laboron, kaj li ne estas hejme ses tagojn dum la semajno.”

“Tre bedaŭrinde, ĉu ne?”

“Tute ne. Nur unu tago eĉ tre rapide pasos!”